



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 5,

Septembro/Oktobro 1963

Ankaŭ fervojoj devas reklami

La taskoj de la esperantistoj ne limigas sin sole perfektigi en la uzo de la Internacia Lingvo. Esperantistoj devas varbi, la fervojistoj precipe en sia faka medio. Simila estas la situacio de la fervojo. La konkurenco de la aliaj trafikiloj estas forta. Multaj servoj, novaj kaj jam delonge instalitaj, fariĝis konataj en la publika opinio nur konekse kun alloga reklamo. La ĉi suba artikolo elĉerpita el la internaj informoj „WER-Mitteilungen“ okupiĝas pri la diversaj flankoj de la fervojo varbado. Eble ankaŭ vi profitos.


„La konsumanto ĉiam devas esti flatata, trankviligata, ŝirmata, persvadata kaj traktata ĝenerale kiel infano“, tekstas en la raporto de studkomisiono de la Rockefeller-fondaĵo. Jen la trafa nomo. La konsumanto baldaŭ scias, kiel prijuĝi la situacion. Kelkiuj asertas, ke ili ne lasas influŝi sin per reklamo. Sed tio estas unu el la memtrompoj kaj iluzioj, kiuj akompanas la homon dum lia vivo. Pri la hipnota varbpotenco de bildoj, sloganoj kaj trafaj tekstoj estas skribita jam multe. Sed tamen varbado estas aktuala kaj fariĝis ekonomia faktoro de la unua rango.

Rigardite el popolekonomia vidpunkto la transporto de la fervojo estas varo kiel ĉiu alia bezonanta reklamon. Ĝia plej trafa argumento, la sekureco, estis uzata ĝis nun nur per modesta reteno. („La Germana Federacia Fervojo ofertas al siaj pasaĝeroj la optimon de sekureco, kiu estas ebla en la moderna trafiko“). La fervojo ne ŝatas la eventualan riproĉon, ke sia reklamo laboras per maldecaj metodoj, kiuj memorigas pri maldigna

konkurenco kaj kiuj damaĝas al la reputacio de granda trafikentrepreno. Pro tio la fervojo ne utiligas la „laŭcelan statistikiston“. Sed la tribunaloj decidis jam delonge, ke la iam farita malpermeso de la „kompara konkuro“ ne validas por vereca reklamado. Ĝustaj indikoj estas permesitaj. La „regna komercisto“ ne perdas sian reputacion, se li ofertas siajn varojn surbaze de vareco kaj cbligas per katalogoj al la konsumanto la komparon kun aliaj produktoj. Estas ja nefiksita leĝo, ke nobla viro ne laŭdas sin mem. . . Sed en la komerca vivo validas pli multe la proverbo de la svisa poeto Heinrich Leuthold (1817—1879): „Se vi ne mem malfermas la buŝon, la aliaj silentigas vin ĝismorte.“ Efikplena estas la varbado, se ĝi interligas la verecon per facile kontroleblaj nombroj. Ekz. laŭ la oficiala Statistika Jarlibro de 1960 perdis sian vivon 14 109 homoj per la aŭtomobilo, per la Federacia Fervojo 454, el ili 72 pasaĝeroj kaj el tiuj 72 nur unusola senkulpe, dum 71 mortis proprakulpe. (El la ceteraj mortintoj 155 estis fervojistoj kaj 227 fremdaj personoj.)

La reklamado demonstrante la verecon turnas sin al la racio. Sed ĝi devas alparoli ankaŭ la senton. La arto de la reklamsikologio ja konsistas el tio formi tekstojn kaj imagojn, kiuj vigligas la nekonscion en la homo kaj vekas dezirojn en li, sen kies plenumiĝo li ne taksas sian feliĉon komplota. Kiel granda estas la varbpotenco de la ekstera allogo, preskaŭ ĉie estas konate. Oni ne subtaksu la aspekton. Kiam usona cigaredo aperis en pli plaĉa skatolo, la konsumado dekokobliĝis, kvankam la kvalito neniel estis ŝangita.

Aliflanke la influiga scipovo de reklamisto ne rajtas prezenti sin tiel maldelikata, ke en la konsumanto ekestas la sento esti ne konvinkita, sed trompita. La varbado de la fervojo estas en la



Tiu horloĝo precize indikas la tempon, kiam forveturas via trajno al la jarkunveno de GEFA en Regensburg. Ĉu vi forsendis vian aligilon? Limdato estas la 1a de oktobro!

feliĉa situacio ne bezoni troigojn, ĉar la faktoj prezentas sin kiel modela bazo de vereca reklamo. Ne estas refuteble, ke la funkcia sekureco konekce kun la deviga severa respondeco igis la fervojon la plej bona kaj malmultekosta asekuro kontraŭ akcidento kaj morto.

La reklamspecialisto pensas „psiko-logike“ t. e. li kunligas psikoncion kun logika pensado. Sana racio kaj ideriĉeco helpas al li vekti en la kapoj kaj koroj la imagon, ke estas preskaŭ krimo ne utiligi la fervojon por granddistanca vojaĝo. Ne estas frivole aserti, ke la cent homoj perdintaj sian vivon dum la paskaj festotagoj, tre verŝajne povus vivi, se ili estus adaptintaj tiun logikon. Sed neniam la racia ago estis memkomprenebla — ĉar la mondo estas regata ne per la racio, sed per la sentoj. Ke la Federacia Fervojo ofertas al siaj pasaĝeroj la optimon de sekureco, la leganto konstata senpasje. Lia decido fari la ferian vojaĝon suden per la aŭtomobilo, estas apenaŭ influata. Sed pli trafte scipovas argumenti la apelacio pri la memkonservado: „Pensu pri tio! La cent homoj, kiuj mortis dum la paskaj festotagoj, povus vivi ankoraŭ, se ili estus vojaĝintaj perfervoje!“ Robusta, sed evidenta penso.

Ĉiuj tiuj metodoj apartenas al la direkta reklamo. Ĝi estas kompletigata per la maldirekta interna reklamo, kiu celas fari la fervojojn tiel atraktiva, ke al la pasaĝero ne plu restas io dezirinda. Lin ĉagrenigas, se neniu prizorgas onin, se la servo de la pakajportistoj fiaskas, se la konduktoro estas malĝentila, se ne ekzistas sufiĉe da sidlokoj, se la precizeco malkontentigas aŭ se la restado en la limstacio estas netolereble longa. Kompreneble la fervojo ne estas kontenta pri tiuj mankoj kaj ĉiam celas forigi ilin. Ke ĝi sukcesis, provas la entuziasma laŭdo de sinjoro, kiu asertis volonte:

„Ne ekzistas pli agrabla vojaĝo ol tiu en la TEE-trajno.“

Jubileo en Frankfurt

La kvinjala konstruaĵo de la ĉefstacidomo en Frankfurt (Main) estis 75jara en aŭgusto. Multe detruita dum la lasta milito ĝi restariĝis en konservativa aspekto, sed interne kun modernaj instalaĵoj, ĉefe en la signalregadejo. Dum unu tago trafikis tie 1250 pasaĝertrajnoj. Nuntempe la stacio de Frankfurt apartenas al unu el la plej gravaj trafikcentroj de Germanio. Ekzistas grandskalaj projektoj kombini la projektitan subteran tramtrafikon kun tiu de la fervojo.

Trafikekspozicio en München 1965

168 nacioj estas invititaj per la diplomata vojo partopreni la Internacian Trafikekspozicion (germanlingva mallongigo I. V. A.). Laŭ la aserto de la germana trafikministro Seebohm temas pri la „unua monda fakekspozicio de la trafiko“. Kiel centro elstaros la fervoja trafiko sur areo de 10000 m² en haloj kaj de 30000 m² ekstere.

En la enirpavilono el vitro estos montrata granda modelfervojo. La plej alloga objekto estos naturgranda stacihalo. Vagon-

restoracio ofertas sidlokojn por 200 personoj. Ankaŭ eksterlandaj fervojoj demonstras la plej novajn progresojn rilate la fervojan teknikon. Krome estos reprezentataj i. a. la poŝtaj instalaĵoj, la publikaj trafikiloj, la urba, la strata kaj la aviadila trafiko, la interspaca veturado kaj la turismo.

Amikojn vi nombras amase, dum vin favorigas feliĉo.

Sed kiam la tempoj malbonas, vi estos lasita tutsola. Ovid

Telegvidataj lokomotivoj

Ne maltrankviliĝu: la trajnoj en Germanio veturas ankoraŭ kun normala lokomotivo gvidata per fervojisto. Tamen en la manovra stacio Mannheim oni provas doni ordononj sendrate al speciala lokomotivo. Tiu posedas instalaĵon, kiu permesas la akcepton de signaloj kaj transformas ilin en akcelajn movojn. Dua lokomotivo same ekipita prizorgas la bremsadon per aerpreno. En la stadio de provoj kaj esploroj la lokomotivgvidanto ĉeestas ankoraŭ por kontroli la funkcion. Ekstere de la telegvidata centro la lokomotivo

devas esti gvidata per fervojisto laŭ la ĝisnuna metodo.

Facila monŝanĝo

La Germana Trafika Kredit-banko (germanlingva mallongigo DVKB), kies akcioj grandparte apartenas al la fervojo, disponas pri 56 monŝanĝejoj en stacidomoj kaj flughavenoj, en gravaj limstacioj kaj sur pramŝipoj al Danlando. El 135 valutoj de la mondo, kiuj estas indikataj en la tabularo de la Germana Federacia Banko, estas ŝanĝeblaj ekz. en Hamburgo 125 valutoj.

Nova signalregadejo en München

Post unu jaro nova centra signalregadejo en München anstataŭos 17 regadejojn malmodernajn. Nuntempe la konstruaĵo mem estas finita. La mondkonata firma Siemens instalas la teknikajn elementojn laŭ la plej nova stato de la relekuriga sistemo. Estonte kvar trafikfunkciuloj regulos de unu tablo, pli precize de unu reלבildregadejo, la vojojn por la trajnoj. Entute 296 rel-

komutiloj kaj 450 signaloj povos esti centre funkciataj kaj kontrolataj por 1000 trajnoj kaj 5000 manovraj veturoj potage. La nova centra regadejo kostas 12,5 milionojn da gm, sed jam post 12 jaroj la investita kapitalo estos superinta la elspezojn por la ĝis nun necesa personaro kaj materialo, unu miliono da gm poŝare.

Noktekspreso al St. Tropez

Ke malproksimaj vojaĝoj, precipe al la maro kaj sub suda suno, povos esti dezirrevo — kiu ne scias tion? En la fantazio ni sentas plenplenajn de sopiro la mallautan luladon de la trajnavogon kaj vidas la preterflugantan pejzaĝon. Antaŭĝojo prezentas sin.

Juna viro nome Teddy Parker antaŭ nelonge donis al tia stimula sento sonan esprimon. Per modkanta disko li logas al veturado en la „Noktekspreso al St. Tropez“. Aha, ni memoras: franca Riviero, luksaj ŝipoj, ominduloj ambauŝeksaj, multekostaj festoj kun ŝaumvino, Brigitte Bardot, aliaj aktoroj kaj „steletoj“. S-ro Parker havas grandajn projektojn. . .

Sed ne. La trubaduro gaje donas informon. „Mi ne estas riĉa

homo, mi ne estas Ali Khan.“ Modeste li staras apud la fenestro en la nokta trajno kaj li nur pensas al blanka sablo de St. Tropez kaj al sennoma juna virino. La perfekta dezirrevo, kaptita el la vivo.

Jes, bone, dezirrevo, sed tute alie, kiel opinias la vojaĝanta Teddy. Kiel? Nun, provu ricevi bileton al St. Tropez! Serĉu en la horaro noktan ekspreson tien! Montrigos, ke tio estas vana! Ĉar St. Tropez ne estas stacio. Neniu trajno veturos al tiu loko, nek tage, nek nokte, ne por Brigitte Bardot, sekve ankaŭ ne por Teddy Parker. De la „Noktekspreso al Les Arcs“ li kantante estus devinta revii aŭ de „Noktekspreso al Fréjus“ aŭ de „Noktekspreso al St. Maxime“ — tiuj

estas la plej proksimaj stacioj. Ties nomoj certe ne sonas tiel belaj, ne tiel fandaj kaj logaj. Egalc, ni lasos al la juna viro lian gojon kaj liajn dezirojn — kiel al ĉiuj inter ni, kiuj en la ĉiutaga vivo subite ricevas grandajn okulojn, ĉar ili revas esti en rapida trajno sur aventura veturado.

(Tradukita el „Rad und Schiene“ E. Kruse)

Kie la reloĝ ne ligas

Ĝis 1945 inter la okcidentgermana stacio Walkenried kaj la orientgermana stacio Nordhausen la trafiko estis tre vigla. Nuntempe veturas nur ses frajtrajnoj potage. Kiam estas anoncita trajno per speciala signalo, orientgermana fervojisto sub kontrolo de ŝtatpolicisto devas malfermi la ŝlositan pordon, kiu baras la reĵaron inter okcidento kaj oriento.

Fervoja kuriozaĵo

La privata „Furka-Oberalpferovojo“ en montara regiono de Centra Svislando malmuntas sian ponton en 1800 m dum la vintra sezono. Fine de septembro de ĉiu jaro la ponto estas levata kaj tirata al la fundamento. Kvazaŭ faldita la ponto povas rezisti al la lavangoj dum la vintro.

Neues Flugblatt

Der Deutsche Esperanto-Bund hat für die Werbung, vor allem unter der Jugend, ein neues zugkräftiges Flugblatt von 4 Seiten im Format DIN A 5 mit der Überschrift „Sich verstehen — aber wie?“ herausgebracht. Wir empfehlen unseren Gruppen sehr dieses bebilderte Werbemittel. Kosten: 2 Pfennige und weniger, je nach Menge. Bestellungen sind an „Fr. Gerlinde Holzmann, 5204 Hangelahr, Waldstr.“ zu richten. Gleichzeitig ist der Betrag zu überweisen an „Deutsche Esperanto-Jugend, 29 Oldenburg/Oldbg. P. S. Kto. Karlsruhe 545 77“.

Zweimal oder viermal?

GEFA Abkürzung für Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten. GEFA bietet im Bundesbahn-Sozialwerk die organisatorische Form, um Esperanto zu erlernen und nutzbringend anzuwenden. GEFA ist der deutsche Landesverband im

IFEF Abkürzung für Internationaler Verband der Eisenbahner-Esperantisten. IFEF ist eine Fachorganisation mit Sitz in den Niederlanden und Mitgliedern in allen Erdteilen.

Der Mitgliederbeitrag für beide Organisationen einschließlich Bezug des „BULTENO“ und „La Internacia Fervojo“ beträgt im Jahr nur 2,50 DM!

Sicher sind Sie bereit, mehr zu leisten.

Wir empfehlen Ihnen daher die Mitgliedschaft in folgenden Organisationen:

GEA Abkürzung für Deutscher Esperanto-Bund. GEA setzt sich für die allgemeine Verbreitung des Esperanto in Deutschland ein. Dies ist nicht Aufgabe eines Fachverbandes, jedoch ebenso wichtig. GEA ist der deutsche Landesverband im

UEA Abkürzung für Esperanto-Weltbund. Ihm gehören kollektiv GEA und IFEF an. UEA hat weltweite Aufgaben. Jeder sprachgewandte Eisenbahner-Esperantist sollte Fachdelegierter seines Wohnorts sein.

Wenn Esperanto in allen Lebensbereichen Weltgeltung erreichen soll, bedarf es einer um-

fassenden Unterstützung. Vier Mitgliedschaften sind nicht wenig, aber erfolgreicher als der Austausch von Ansichtskarten.

La jubileodonaco

Bommel laboris dum 25 jaroj en la firmo. Dum la jubilea tago vokis lin la ĉefo en sian ĉambron, transdonis al li tre solene koverton kaj dankis al li pro la ĉiam fidela servopreteco. Kiam Bommel atendplene malfermis la koverton, li tenis en siaj manoj foton de la ĉefo kun aŭtogramo — kaj alie nenion. „Nu, kion vi diras je tio?“ demandis la ĉefo.


Kaj Bommel respondis: „Tio vere similas al vi!“
(tradukis E. Kruse)

Dumnokte aŭdas mi lokomotivojn, malproksimec krias sopirplene, en lito min turnante pensas mi:

„Vojaĝi...“
Kurt Tucholsky

Ĉu vi jam...

uzis la glumarkojn kaj afiŝojn kiujn GEFA havigis por via varbado? La stoko ne plu estas tre granda. Mendu ilin baldaŭ ĉe nia sekretariejo.



Jen la fronto de la nova dizellokomotivo (serio V 200), kies tirkapableco de 2500 ĉevalfortoj superas je 25% tiun de la antaŭa serio.

Wir erwarten die Mitglieder und Freunde unserer Vereinigung zur 7. Jahresversammlung in Regensburg am 19./20. Oktober 1963.


Anmeldeschluß: 1. Oktober
Anmeldevordruck mit Programm erhältlich über die Bezirksbeauftragten oder
Frl. Marg. Kammerer, Bautechnisches Büro der Bundesbahndirektion Regensburg.

EL LA GRUPOJ . . .

Frankfurt. Komence de septembro membroj kaj amikoj de la fervojista grupo kolektiĝis en la fervoja kantino, kiel ĉiun unuan merkredon de la monato, por aŭskulti s-anon Jäger pri lia interese prezentita raporto pri la UE-kongreso en Sofio. Evidentiĝis, ke neniam post la mondmilito kunvenis tiom da kongresanoj, kredeble 3900. La riĉa kaj apenaŭ konsumenda programo antaŭvidis ankaŭ kunvenon de la fervojistoj kaj regalon per la trafikministerio. La faldfolioj de la Germana Federacia Fervojo estis disdonataj.

Trilanda renkontiĝo

La Svisa Esperanto-Societo kaj la Esperanto-grupoj de Dornbirn kaj Bregenz invitas al renkontiĝo en Bregenz la 5an kaj 6an de oktobro 1963. El la riĉa programo elstaras amuza vespero kun popoldancoj, distrado per sorĉisto kaj ventroparolisto, diservoj por ambaŭ konfesoj, ekskursoj per kablofervojo al la Pfändermonto kaj sur la lago de Konstanz. Aligu ĝis 30a de septembro al „s-ro A. Stamm, Feldgraben 26, Dornbirn, Aŭstrio“ aŭ al „s-ro O. Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn, Svislando“.



3500 tirveturiloj de la Germana Federacia Fervojo estas jam ekipitaj per sekuriga veturŝaltilo (germanlingva mallongigo: IN-DUSI). Ĝi anstataŭas la duan lokomotivgvidanton. Se la lokomotivestro ne tuŝas la kontrolklavon en regula ritmo, la trajno post du signaloj per lumo kaj korno estas aŭtomate haltigata post tre mallonga tempo.

NI LEGIS EN . . .

Bulgara esperantisto povas anonci (en julio), ke minimume 3300 personoj aliĝis al la UE-kongreso en Sofio, postmilite la plej amasa kongreso.

Bulteno de la Aŭstria Sekcio de IFEF rekomendas (en aŭg.) al la turistoj la uzadon de la Internacia Lingvo.

Cent jaroj de Maica Slovanska estas la titolo de jubilea presaĵo, kiu informas pri historio kaj tasko de tiu kulturinstituto en Slovakio.

Monda kulturo daŭrigas sian altan nivelon ankaŭ en la printempa eldono kiel, internacia revuo pri literaturo, filmo, teatro. Rimarkindaj estas la kontribuajtoj de orienteŭropaj aŭtoroj.

DEFA-Bulteno de la Dana Esperantista Fervojista Asocio malfermas (en sept.) sian vintran laboron anoncante grandkalan programon.

El Popola Ĉinio de la Ĉina Esperanto-Ligo konigas (en n-ro 4) la metian laboron en Tibeto kaj prezentas bildojn de silk-pujoj.

Fervojisto, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, daŭrigas (en julio) sian raporton de impresoj pri la pasinta IFEF-kongreso.

Pri la sama temo raportas la **Franca Esperantisto** (en junio/julio). Interesas ankaŭ la protokolo pri la jarkunveno de la U.F.E. en Perpignan.

Informa Bulteno, organo de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio, instigas (en n-ro 5/6) la partoprenon al la nacia kongreso en Saint Vincent (Aosta Valo).

Interlingvistika Informservo, eldonata de la Societo por Internacia Lingvo, estas sendube la plej interesa kaj serioza periodaĵo sur tiu tereno. Ankoraŭfoje estas esplorataj valoro kaj sekvoj de la artikolo „Welthilfs-sprache nicht gefragt: das Esperanto — seine Erfolge und seine Enttäuschungen“ aperinta en la okcidentgermana gazeto „Frankfurter Allgemeine“.

Jen, bulteno de la Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj, pri-traktas la la interesan vivon de la 87jara s-ro Rosher, pioniro de la terminara laboro.

Jugoslavia Fervojo (aprila kajero) plezurigas per plurkolora kovrilpaĝo kun bildo de la plej nova alumina trajno.

La Fervojo, organo de la Franca IFEF-sekcio klarigas (en aŭg.) la sistemon de la fervoja telepresilo-reto.

Nova Civito, esperantigita revuo katolika, reliefigas (en majo / junio) la personon de la mortinta papo Johano.

The Worker Esperantist, eldonita de la brita laboristaro, okupiĝas (en jul./aŭg.) en sia lingva angulo pri la gramatika demando, kie oni uzas la geografian kaj kie la gentan radikon.

Korespondadon

kun germanaj fervojistoj deziras

- Hermína Bajnoczi, Horváthz str. 37, 33jara flegistino
- Heleno Balogh, Fadrusz str. 4, 42jara operaciasistentino
- Katalin Homoki Szabó, Gábor A str. 48, 17jara lernantino
- Magdolna Meyhárt, Battyányi str. 9, 23jara flegistino
- Katalin Udvardi, Vak Bottyán str. 8, 23jara flegistino
- Agnes Szántó, Városi Kóház, 24jara radiologiasistentino
- László Sági, Molnar telep 21, 46jara fervojisto
- Heleno D. Tóth, Damjanich str. 35, 18jara lernantino
- Johano Dobos, Mav állomás, 20jara fervojisto. Ĉiuj loĝas en Kiskunfélegyháza, Hungario

Bruselo — kongresurbo en 1964

Jam komenciĝis la antaŭpreparaj laboroj por la 16a IFEF-kongreso en Bruselo (Brüssel). Ĝi okazos de la 9a ĝis la 13a de majo 1964. La kongreskotizo estas ĝis la jarfino 200 belg. fr. Rekomendindaj estas la glumarkoj, kiuj po 12 kostas 5 belg. fr. Adreso: s-ro de Bryne, Centra Stacio, Bruselo/Belgio.

Anoncoj

Prospekto de Barcelono

„Barcelono — grafa urbo“ nomiĝas la plurkolora faldfolio en Esperanto havebla per: Hispana Esperanto-Instituto, Str. Montcada, 12 poŝtkesto, 1073, Barcelono — 3, Hispanio

Prospekto de Nancy. La urbo Nancy situanta en nordorienta Francio eldonis germanlingvan faldfolion kun aldona teksto en Esperanto. La plurkolora prospekto estas senkoste havebla per: Turisma Servo, 9 Rue des Dominicains, Nancy (M. et M.), Francio.

La vivo de d-ro L. L. Zamenhof titoliĝas listo, kiu entenas indikojn pri fotoj haveblaj kiel kopioj, diapozitivaj kaj filmstrioj. Adreso: Henk Thien, Uiterwaardestraat 12, Amsterdam/Nederlando.


Librolisto pri precipe en Jugoslavio eldonitaj libroj estas havebla per: Slovenia Esperanto-Ligo, Eldona Sekcio, Komenskega 7, Ljubljana/Jugoslavio, poŝtfolio 239.

Danubo-valo

La „Amt der niederösterreichischen Landesregierung“ en Vieno eldonis plurkoloran faldfolion kun mapo de la Danubo-valo kaj priskribo de la indikitaj lokoj. La prospekto estas senkoste havebla kontraŭ unu resp. kuponon per: Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I/Aŭstrio.

La Internacia Registro de la Mondcivitanoj (I. R. M. C.) serĉas adeptojn kaj kvalifitajn tradukantojn por siaj celoj. Adreso de la ĝeneralsekretario: s-ro Jean Predine, 37 rue Gazan, Paris 14ème, Francio.

Bone taŭgajn paperstelojn glueblajn en verda koloro de unu ĝis tri centimetroj, novspecan kurson „Tra la mondo“ kun aŭ sen sondiskoj kaj 12lingvan lernolibron „Esperanto — la internacia lingvo“ ofertas „Librairie des Editions Nova, 19 Avenue Gustave-Dollfus, Mulhouse (Haut-Rhin), Francio



„Volu atenti, sinjoro, ke la trajno ne plu veturas en la kurbo.“

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Bannickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstraße 4—6. Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervoja Asocio.